

KomitatKunsido (KK)

mardon 06/09/2022

Partopreno

- Pierre Gauthier, vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France (PG) ĉeestas
- Marc Giraud, prezidanto (MG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) forestas
- Aleks Kadar, vic-sekretario (AK) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) rete ĉeestas
- Marianne Pierquin, vic-prezidanto (MP) ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) forestas

Ekde la antaŭa KK

La protokolo de la KK de la 10/06/22 estis aprobita kaj enretigita ĉe <https://esperanto.paris/IMG/pdf/2022-06-10.pdf>

25/06/22 okazis **Tago de Eŭropo** en Antony. Nian budon mendis AK kaj prizorgis gxin FLJ, AL kaj AK. Pli malpli kontentige. (Tamen sufiĉe kontentige por senpaga eta festo : pli kontentige ol malkontentige, AL) Lucien Bresler, Elisabeth Barbay dejxoris. Okazis pluraj kontaktoj.

Okazis 2 **piknikoj**, 09/07/22 en arbaro de Vincennes kaj 13/08/22 en parko de Buttes Chaumont. Bone okazis, krom ke kelkaj plendis, pri la pikniko en la arbaro de Vincennes, ke la loko estis tro malfacila por trovi. Necesas prizorgi, ke la loko estu videbligita per flago aŭ simile. DL aĉetis larĝan flagon en la UK (revendita al FLJ) kaj surtablan flageton por la E-kafejoj en trinkejo/restoracio. Samcele ankaŭ PG aĉetis flagojn (v. sube en "Diversaj punktoj"). Necesas memori ke kiam oni fotas, oni tuj petu permeson publikigi en sociaj retoj.

03/09/22 okazis la **Festo de asocioj de Centra Parizo**. Nian budon prizorgis DL, LPI, MP kaj Said. La budo estis bone lokita kaj suna. Deko da veraj interesitoj. Ni disdonis al aliaj dekojn da kalendaretojn pri 2022. Pri ĝemelaj urboj, la respondeculo estas Paul-David Régnier, oficisto de la tuta urbo en la DGRI (Délégation générale aux relations internationales). DL havis kontakton kun nia deputito Clément Beaune. Ni invitu lin por la eventoj kun la ĝemelurbaroj.

Homara Festo (9-11/09/22)

AK prizorgas la organizon. La budon pagas Espéranto-France kaj FLJ. Estis malfacile varbi deĵorantojn. Ĉu nun estas sufiĉe da? Jes, tri homoj samtempe. DL, aliginte nur kiel "eble" por sabato ptm, ne venos.

AK devas rigardi ĉu estos elektro en la budo por uzi la televidon. AK devas peti ŝildeton "macaron" por la veturilo. Okazos specifa kunsido (tuj post la nuna KK) por prepari. Nia federacio disdonos la broŝuron "langue équitable" kaj pagos al Espéranto-France.

Malfermitaj pordoj 17/09/22

En la sidejo, 10h-18h. Kiu pretas deĵori? MP kaj Said la tutan tagon. LPI venos ĉu matene ĉu posttagmeze, laŭ la bezono. Necesas prepari paperan formularon por noti la informojn de la vizitantoj:

- kiuj deziras aliĝi al iu kurso,
- aŭ deziras aliĝi al la dissendolisto Amikaro por ricevi informojn pri niaj eventoj.

Ĉu la instruistoj povos veni iam dum la tago por prezenti sian kurson? FLJ ne. MG ne. MP jes. PG jes, Ĉu AL povos montri ludojn iam dum la tago? Jes

DJ anoncis en la retejo ke okazos testo de nivelo por helpi la vizitantojn elekti la ĝustan kurson, ĉu li havas tute pretan teston, eble farita de ILEI? Jes! MP jam pretigis ilin.. prenis ĉe Edukado.net

Kursoj

Listo de la ĉi-jaraj kursoj:

- komencantoj, gvide de PG, ĵaŭde 19h-20h30, surloke
- progresantoj, gvide de MP, lunde 18h30-20h, surloke
- progresantoj, gvide de MG, vendrede 18h-19h30, rete per Skype
- spertuloj, gvide de FLJ, marde 18h30-20h, surloke

La kursoj komenciĝos lundon 03/10/22. PG devas ricevi ŝlosilon.

EDUKADO.NET : ĉiu instruisto bonvolu registri sian kurson en la retejon Edukado.net. La loko estu "Parizo", ne "Paris".

Anoncotaj prezoj de la kursoj, por la tuta jaro 2022-2023, inkludante la kotizon al la asocio:

- surloka kurso: normala prezo 109€, malalta prezo por senimpostuloj 45€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 30€
- reta kurso: normala prezo 59€, malalta prezo por senimpostuloj 20€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 5€

Kiel aliĝi?

Novaj homoj povas aliĝi:

- per la reta formularo, kiu estas sur nia retejo <https://framaforms.org/formulaire-de-pre-inscription-cours-desperanto-2022-2023-1661770580> kaj LPI resendos al la instruisto
- dum la malfermaj pordoj per papera formularo (vidu ĉi-supre), LPI kolektos kaj informos la instruistojn
- per mesaĝo al info@esperanto.paris kaj LPI resendos al la instruisto

Kompreneble la malnovaj studentoj mem aliĝu rekte ĉe la instruisto!

La instruisto kreu kaj prizorgu la liston de siaj lernantoj.

Kiel pagi?

La 2 unuaj kursoj estas senpagaj por novaj homoj, kiel provo. Poste, t.e. dum la 3a kurso, ĉiu instruisto devas peti de siaj lernantoj ke ili pagu por daŭrigi la kurson, kaj poste la instruisto devas kontroli ke ili tion faras (vi povas demandi al LPI aŭ DL aŭ Said ĉu iu aliĝis aŭ ne al Espéranto-France).

- surloka kurso: la studento devas pagi al la instruisto la kurson mem, kaj la instruisto devas doni al DL la pagon de la kurso, por la kaso de nia francilia asocio, nepre antaŭ decembro por ke li enkasigu ĝin antaŭ la jarfino. Krome, la studento devas aliĝi al Esperanto-France pagante ĝian kotizon, ĉu rete <https://esperanto-france.org/adherer> ĉu (lasante ĉekon) surloke pere de Said.
- reta kurso: la reta kurso mem estas senpaga. La francaj studentoj devas aliĝi al Esperanto-France pagante

ĝian kotizon <https://esperanto-france.org/adherer>

Memorigo de la kotizo de Espéranto-France: normala prezo 59€, malalta prezo por senimpostuloj 20€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 5€

Memorigo de la prezoj de la surloka kurso sen la kotizo: normala prezo 50€, malalta prezo por senimpostuloj 25€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 25€

Ĝemelaj urboj Romo-Parizo

Vojaĝo al Romo en aŭtuno 2022, dum Ĉiusanktuloj, privata kaj maloficiala vojaĝo.

Nia asocio invitos la Romanojn en Parizon, kadre de nia jarkunsido, dum semajnfino en marto: **18 kaj 19/03/22**.

Kio pri buĝeto? Nia asocio estos deficita en 2022, kio pri 2023, laŭ nia kasisto? dependos de la planitaj elspezoj. Kio pri la programo de la vizito? Estis jam menciitaj: turismo, biciklado, ludsesio.

Ĉu indus pripensi renkontiĝon kun la oficialuloj de Parizo en la urbodomo? jes

kun la ĝenerala asocio pri la ĝemelaj urboj Parizo-Romo? (vidu ĉi-supre pri la festo de asocioj de Centro Parizo pri la DGRI, ĉu estas ankaŭ asocio?)

Kio pri loĝado? Dependas de ilia nombro, eble ni povos gastigi. Necesas nombri kiom da dormlokoj ni havas. Ĉu krei teamon kiu laboros por prepari la viziton? jes, gvidota de MG.

Zamfesto

Ĝi probable okazos sabaton **17/12/2022** (aŭ la **10/12/2022**?) ptm 19 rue Traversière, apud Gare de Lyon. Kiu kontaktas la fervojistojn? DL Ĉu la KK konsentas dividi la koston? jes, en la limo de 100€, kiel kutime

Rilatoj kun la urbo

Estus bone, ke iu respondecu pri la rilatoj kun la urbodoma administracio de Centra Parizo:

- informi ilin pri niaj eventoj dum la venonta monato, por publikigo en ilian monatan dissendoliston
- doni niajn afiŝojn por iliaj oficialaj afiŝtabuloj
- informiĝi pri eblaj subvencioj, lokaj projektoj, ktp.
- peti salonon por la ĜA, skriba ekzameno, ktp kiam necesas
- peti inviton de la Romanoj, ekz. ĉe la vicurbestro pri asocioj Yohann Roszévitch
- organizi agadon en loka lerneja korto por konigi E-on, se troveblas volontulo
- ktp

DL sin proponas por la unua punkto

Diversaj punktoj

PG aĉetis dum la UK verdan flagon (90 cm x 60 cm) kaj surtablan flageton, la federacio repagos. Verdaj ĉapeloj: restas ĉirkaŭ 10 en la sidejo.

Agadoj kaj projektoj... denove!

- Babilrondo Parizo-Romo ĉiumonate la 1-an sabaton
- Legoklubo kelkfoje jare
- Esperanto-kafejo ĉiumonate la 2an sabaton vespere (krom escepto)
- Espéranto café-croissant ĉiumonate sabate matene GVN esperas denove okazigi en oktobro
- Kultura vespero la 1-an merkredon, kaj se eblas la 3-an merkredon

- Ludoj ĉiumonate la 1-an dimanĉon, krom escepte la 2an. Ekde Oktobro.
- Kontakti la mezlernejojn: GVN
- Kontakti la publikajn bibliotekojn: MP, ni aĉetis dekon da Metodo11 por disdoni
- Subglasoj: GVN ni kundividis la elspezon kun Esperanto 94
- Vojaĝoj de Lucien Péraire: okazis prelego, Régis Fournier kreis filmeton, la notoj estas ciferecigitaj, GVN preparas ekspozicion por 2022 konfirmenda de GVN
- Ministerio pri financaj aferoj: DL, LPI, PG necesas kontakti la novan respondeculon pri kulturaj sekcioj
- Specifaj kursoj por prepari kandidatojn al la KER-ekzamenoj: FLJ
- Duolingo: oni rajtas reklami en Duolingo niajn eventojn nur se ili okazas rete per ilia Zoom salono, nur tiel oni povus allogi duolinganojn. UEA organizas tiajn babilrondojn. AL pripensas la aferon, eble li faros sendependan sesion por informi pri surlokaj agadoj.

Respondeculoj pri agadoj: ĉu ŝanĝoj? Ne.

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Ludoj: AL kun Marielle Martin
- Ekzamenoj : FLJ ĉar KER-ekzamenoj denove okazas surloke, ĉu ni organizos surlokajn ekzamenojn? Jes, ni provas por la novembra tutmonda sesio (se oni respondas antaŭ la 15a de septembro)
- Esperanto-kafejo: GVN
- Espéranto café croissant: GVN
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier
- Prelegturneoj (kiam eblos kaj estos landa respondeculo): FLJ

Notu bone: post evento, la respondeculo sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org por publikigo en la sekva reta monata gazeto Esperanto-Aktiv
 Notu bone: Michèle Abada-Simon pretas helpi kaj ĉeesti niajn eventojn.

Respondeculoj pri informkanaloj: ĉu ŝanĝoj? Ne.

La unua kanalo estas la retejo <https://esperanto.paris> la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ (AL)
- Facebook MG DL MP
- Twitter.com/esperanto_paris PG
- Dissendolisto Amikaro LPI (MG)
- Telegramo AL
- Amikumu PG
- Eventa Servo MG AK (MP)
- Meet-Up DJ

Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos **02/12/22** je la 7a ptm surloke/rete/mikse. Ni ekpreparos la januaran reĝkuko-feston, la 2023 ĜA-n okazonta 18/03/23 kaj la viziton de la Romanoj okazonta 18 kaj 19/03/23.

FINO DE LA KK